

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1984



28. GEFA-Jahresversammlung vom 12. - 14. 10. 1984 in Mönchengladbach



La GEFA-flago flirtas antaŭ nia kongresejo
(kastelo Rheydt maldekstre sur poŝtmarko)

foto: J. Grass

Sukcesplena jarkunveno de GEFA 1984

Akompanite de agrabla velero disvolviĝis la 28a jarkunveno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) en la okcidentgermana urbo Mönchengladbach. De la 12a ĝis la 14a de Oktobro 1984 la asocioj kun siaj en- kaj eksterlandaj geamikoj el sep landoj kolektiĝis por sia plej grava landa kunveno.

Harmonia akcepto

Jam en la stacidomo la alvenintaj kongresanoj ricevis la unuajn informojn pri la elektita hotelo kaj pri la situo de la kongresejo. Grandparte oni loĝis en la hotelo Dorint, luksa kaj pro tio ankaŭ multekosta malgraŭ rabato. Elegante aspektis la kongresejo nomita „Erholung“ (ripozejo) kun siaj bone flegitaj salonoj. Antaŭ la pordego flirtis la nova Esperanto-flago, bonvena donaco de amikoj el Hamburg. En la akceptejo la senlaca LKK-ano Mester disdonis la dokumentojn kaj enkasigis la kotizojn. La plej grandan parton de la salonego plenigis la tabloj kun esperanto-libroj, prospektoj, kasedoj, diskoj kaj insignoj, kiujn la Esperanto-Centro Paderborn ofertis al la vizitantoj. Ankaŭ la fervojistaj artistoj de la pentranta branĉo sur la muroj povis ekspozicii siajn allogajn verkojn. Dum la kongresaj tagoj fervojistaj radio-amatoroj el la distrikto Köln eluzis siajn sendstaciojn por informi minimume 25 en- kaj eksterlandajn radio-amatorojn pri la GEFA-aranĝoj. Bonega kunlaboro kun aliaj libertempaj branĉoj de BSW. Menciinde ke la regiona televido filmis scenojn jam vendredon en la ĉefstacio.

Vendredon posttagmeze kolektiĝis la kongresanoj alvenintaj ĝis tiu tempo en la historia urbdomo por la oficiala akcepto de la urbo. Ĝin prezentis la urbestro elektita nur unu tagon antaŭe sekve de la ĵus okazintaj komunumaj balotoj. Je ĉies surprizo la urbestro evidentiĝis kiel fervoja kolego, kio pliagrabilis la ceremonion. Oni interŝanĝis afablajn frazojn kaj donacojn, ne sen konsumi la donacitajn trinkaĵojn. La vesperon la plej multaj pasigis en la kongresejo salutante siajn geamikojn kaj aŭskultante la muzikon, kiun s-ano Hantschel kun vervo kaj kapableco produktis per sia elektronika orgeno. La estraro de GEFA intertempe pritraktis asociajn problemojn.

Eventoriĉa sabato

Kiu fininte en la hotelo la abundan matenmanĝon rapidis al la kongresejo por

partopreni la rondiradon en la urba centro, ne bedaŭris sian decidon. Kune kun lerta gvidanto oni vizitis la viglan foiron, novkonstruitajn zonojn por piedirantoj kaj idiliajn angulojn, kiuj ne estis pereintaj dum la lasta milito. Kulmino estis la vizito al la baziliko el la 11a jarcento kun sia frugotika fiorejo. Oni povis ĝui specialan orgenan koncerton.

Samtempe kunvenis la GEFA-estraro kun la Esperanto-komisiitoj de la dek distriktoj kaj komisiitoj por specialaj taskoj. Denove aperis televida teamo; ĝi filmis parton de la diskutoj kaj de lingva ekzameno. Apartajn bondezirojn pro sia distingo per la Federacia Meritkrucito ricevis GEFA-prezidanto Joachim Giessner flanke de la ĉeestantaj Esperanto-funkciuloj sed aŭkaŭ la oficiala reprezentanto de la ĉefestraro de la Socialorganizo kore gratulis. Je tiu okazo li akcentis la elstarajn aktivaĵojn de la esperantistaj fervojistoj, kvankam ilia nombro estas malpli granda ol tiu de aliaj kulturaj grupoj. Kiel nova sekretario de GEFA estas prezentita s-ano Riehn el Ludwigshafen. Gojigan sukceson oni konstatis en la vendado de la lingva telekurso. Ĉiuj respondeculoj estas petataj direkti la novajn lernantojn al membriĝo de GEFA, ĉar dum la lastaj jaroj konsiderinde malboniĝis la strukturo de la asocio kaj laŭ la nombro kaj laŭ la mezaĝo de la membroj. S-ano Ritterspach klarigis la staton de la tradukaj laboroj por la neologismoj aperontaj en la venonta fervoja leksikono de UIC (Unio Internacia de la Fervojoj). Detale oni diskutis pri la agado de GEFA dum la UK Augsburg 1985 kaj fiksas, ke la 29a jarkunveno de GEFA okazos de la 4a ĝis la 6a de Oktobro 1985 en Lichtenfels (Bavario) laŭ invito de la distrikto Nürnberg.

Tradicia ekskurso

Post la komuna tagmanĝo startis du aŭtobusoj akompanitaj de urbaj gvidantoj. La rondveturo kondukis tra la regiono de urboj Mönchengladbach kaj Rheydt, kiuj formas depost kelkaj jaroj unusolan

komunumon. Oni preterpasis la modernan muzeon Abteiberg (Abateja monto) kaj la teatron. Industriajn entreprenojn sekvis interesaj domaroj sur lokoj, kie iam troviĝis tekstilfabrikoj. Rimarkindaj estis la konstruaĵoj servantaj al la sporto kaj saneco. Ke Mönchengladbach ludas specialan rolon en la futbalsporto, estas sufiĉe konate. Ĉelo de la ekskurso estis la renesancstila kastelo Rheydt antaŭe konstruita kiel akvofortikaĵo. Antaŭ la vizito al la tieaj muzeoj la kongresanoj konsumis kun bona apetito kafon kaj kukon en la apuda restoracio. Bedaŭrinde unu el la eksterlandaj gastoj suferis tie akcidenton. Dum trideko preferis informi sin pri la historio de la tekstila branĉo, la aliaj admiris la modele aranĝitajn artkolektaĵojn en la kastelaj salonegoj. Ĉion akompanis agrabla vetero.

Festvespero

Sabaton vespere, post abunda vespermanĝo, la kongresanoj kunvenis por la tradicia festvespero. La virinoj konkuris per belaj roboj, la plej multaj viroj ne povis kaŝi sian progresintan aĝon. S-ano Herlitz, la senlaca organizanto de tiu jarkunveno, malfermis la vesperon. GEFA-prezidanto Giessner salutis inter la honorgastoj precipe s-ron Henn de la fervojdistrikto Köln, s-ron Kreutzer de la Germana Fervoja Asekurkaso (DEVK), s-ron Kreuz de la distrikta Sindikato de Germanaj Fervojoficistoj (GDBA) kaj s-ron Dulat de la distrikta Sindikato de Lokomotivestroj (GDL). En la festparolado evidentiĝis la valoro de la lingva interkompreniĝo. Esperanto estas pli ol hobiaĵo; ĝi interligas homojn trans ĉiujn limojn.

Apartan honorigon ricevis la eksiganta sekretario Joachim Schrapp. Dum la lastaj naŭ jaroj li prilaboris, subtenita de sia vigla edzino Ursula, sennombrajn administrajn taskojn modeste, sendube kaj fide. Esperantisto de post 1951 li oficis kiel komisiito por Esperanto ĝis la likvido de la distrikto Münstereifel en 1974. Schrapp apartenis al tiuj aktivuloj, kiuj forte kunlaboris por la bonfarto de GEFA kaj la nobla celo de Esperanto entute. Multajn internaciajn kaj landajn kongresojn li partoprenis, eĉ en internaciaj ski-semajnoj. Kiel eksteran signon de la profunda danko la GEFA-prezidanto s-ano Giessner bildlibron pri la vivo de

Zamenhof kaj esprimis la esperon, ke oni vidos ankoraŭ ofte s-anon Schrapp kun sia edzino ankaŭ sen oficiala tasko en naciaj kaj internaciaj rondoj.

Multnombraj estis la salutoj kaj bondeziroj flanke de la gastoj: s-ano Rösemann nome de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), s-ano Hirsch por la Germana Esperanto-Asocio (GEA); la IFEF-sekciojn reprezentis s-ano de Sutter (Belgio), s-anino Mateeva (Bulgario), s-ano Horn (Francio), s-ano Bultmann (Nederlando), s-anino Chmielewska (Pollando), s-anino Fiechter (Svislando). Kun aplaŭdo akceptitajn kontribuadojn gajnis la fanfaroj de juna muzikistaro kaj la gajaj kantoj – bedaŭrinde ĉiuj en germana lingvo – de fervojista virĥoro, ambaŭ el la loko Hohenbudberg. La sekvaj horoj rapide pasis, ĉar por la dancemuloj muzikis la Eldorado-muzikistaro. Laŭdire kelkaj kuraĝuloj ankaŭ post la oficiala fino vagis en aliaj trinkejoj.

Dimanĉa matineo

Ankoraŭfoje la kongresanoj frekventis la salonegon, ĉar ilin atendis alloga programo. Elfriede Kruse diaprelegis pri siaj unikaj impresoj en Ĉinio, kien ŝi vojaĝis en printempo 1984 kun esperantista grupo el pluraj landoj. Precipe impona estis la varma, amika akcepto en la diversaj vizititaj urboj. Cie atendis la grupon helpemaj, gajaj esperantistoj. Tiu travivaĵo estis ebla nur per Esperanto kaj ne povas esti komparata kun la vojaĝo de ordinara turista grupo. (Raporto sekvas en n-ro 1/85).

Tute alian impreson donis la sekva grandformata sonfilmo pri la lasta IFEF-kongreso, kiun verkis bulgara teamo. La partoprenintoj revidis sin en multaj, bedaŭrinde foje tro mallongaj scenoj. Anstataŭ la moderna akompana muziko eble oni estus preferinta folkloran muzikon. Por tiu bonega kaj kun forta aplaŭdo akompanita filmo la anoncita filmo de Willi Barnickel ne povis esti montrata. Por Danio, lando de la venontjara IFEF-kongreso, varbis alia sonfilmo, kiu montris precipe mirindajn bildojn faritajn el helikoptero. Trian fojon venis la televido en la matineo. La tuto estis elradiigita lundon dum kelkaj minutoj, bonega propagando por Esperanto. La GEFA-prezidanto Giessner atentigis pri la ampleksa jarraporto, kiu troviĝas aparte

en tiu BULTENO. Li apelaciis al la ĉeestantoj uzi ĉiujn fortojn por la disvastigo kaj la noblaj celoj de Esperanto, kaj kun sincera danko al la organizantoj kaj kontribuantoj samkiel al la

partoprenantoj la finis la jarkonvenon de GEFA. Ĝis revido plej malfrue en Oktobro 1985 en Lichtenfels!

W.B.

GEFA-Herbsttreffen 1984

Die 28. Jahresversammlung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) ging am 14. Oktober nach dreitägiger Dauer in Mönchengladbach erfolgreich zu Ende. Presse und regionales Fernsehen nahmen lebhaftes Interesse an der gelungenen Veranstaltung, die durch ihre Vielseitigkeit außer den GEFA-Mitgliedern auch Gäste aus Belgien, Bulgarien, Dänemark, Frankreich, den Niederlanden, der Schweiz und Polen anzog. Das Fernsehen filmte am Freitag Szenen im Hauptbahnhof, am Sonnabend die Arbeitssitzung verbunden mit einem Interview des Vorsitzenden und am Sonntag den Diavortrag von Elfriede Kruse. Am Montag nach der Jahresversammlung wurden die Aufnahmen in einer mehrminütigen Sendung ausgestrahlt. Der Hauptvorstand des BSW war durch Herrn Rother, einem für die Belange von GEFA aufgeschlossenen Beobachter, vertreten. Am Freitagnachmittag wurden 50 Tagungsteilnehmer im historischen Rathaus empfangen. Es war eine der ersten Amtshandlungen des neu gewählten Oberbürgermeisters, der übrigens ein Eisenbahnerkollege ist.

Bei ihrer Arbeitssitzung am Samstagvormittag behandelten die Delegierten zahlreiche organisatorische Probleme. Bei dieser Gelegenheit beglückwünschten der Vertreter des Hauptvorstandes des BSW sowie Willi Graß namens der Esperanto-Funktionsträger den GEFA-Präsidenten Gießner zu der kürzlich erfolgten Verleihung des Bundesverdienstkreuzes, die eine besondere Ehrung für die langjährige Esperanto-Tätigkeit darstellt. Als Nachfolger des bisherigen, am Festabend besonders geehrten Joachim Schropp wurde Hans-Jürgen Riehn vorgestellt. Der von GEFA aufgelegte Fernkursus mit Sprachkassette hat eine erfreulich rege Nachfrage ausgelöst, die auch zur Mitgliederwerbung genutzt werden sollte. Die Übersetzungsarbeiten am Fachwörterlexikon des Internationalen

Eisenbahnverbandes (UIC) werden parallel zur geplanten Neuausgabe fortgeführt. Während des Allgemeinen Esperanto-Kongresses 1985 in Augsburg werden deutsche Eisenbahner-Esperantisten tätig sein und an einem Tag eine besondere Zusammenkunft abhalten. Die 29. Jahresversammlung wird auf Einladung des Bezirks Nürnberg in Lichtenfels (Oberfranken) stattfinden (4. – 6. 10. 1985).

Die übrigen Teilnehmer nutzten die angebotene Führung durch die Innenstadt, die mit einem Orgelkonzert im 1000jährigen Münster auf dem Abteiberg abschloß.

Nach dem gemeinsamen, leider nicht preiswerten Mittagessen im eleganten Tagungshaus „Erholung“ starteten unter sachkundiger Führung zwei Omnibusse zur Rundfahrt durch die herbstliche Landschaft der zu einem Ort vereinigten Städte Mönchengladbach und Rheydt. Sonne und Wärme begleiteten den Nachmittagsausflug. Hauptziel war die ehemalige Wasserburg, die im 16. Jahrhundert zu einem reizvollen Schloß im Renaissancestil umgebaut worden war. Dem gemütlichen Kaffeeplausch schloß sich eine Besichtigung des Textilmuseums und des inneren Schlosses an.

Seinen Höhepunkt erreichte das Jahrestreffen am Festabend. Der Esperanto-Beauftragte für den Bezirk Köln, Erhard Herlitze, eröffnete ihn. GEFA-Präsident Joachim Gießner konnte eine Reihe von Ehrengästen begrüßen, u. a. die Herren Henn vom BSW-Bezirksvorstand Köln, Kreutzer von der DEVK, Kreuz von der GDBA und Dulat von der GDL. In seiner Festansprache hob Joachim Gießner den Wert der sprachlichen Verständigung hervor. Esperanto sei mehr als nur ein Hobby. Es habe einen menschenverbindenden Aspekt. Die Grüße des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEFF) überbrachte Otto Rösemann. Der Deutsche Esperanto-Bund war durch Herrn Hirsch vertreten.

Auch die ausländischen Tagungsteilnehmer ließen es sich nicht nehmen, vor dem Mikrofon ihre Glückwünsche und ihren Dank für die gelungene Organisation zu sagen. Musikalisch wurde der Festabend durch begeistert aufgenommene Beiträge des Jugend-Fanfarencorps und des Eisenbahn-Männergesangsvereins, beide aus Hohenbudberg, umrahmt. Die nachfolgenden Stunden vergingen bei flottten Tanzmelodien der Eldorado-Band viel zu schnell.

Die sonntägliche Matinee vereinte die Tagungsteilnehmer zunächst zu einem Diavortrag, bei dem Elfriede Kruse ihre Eindrücke über ihre ungewöhnliche Reise nach China mit einer Gruppe von Esperantisten wiedergab. In einem anschließenden, von einem bulgarischen Team gedrehten Tonfilm wurden viele Erinnerungen an den letzten, großartigen IFEF-Kongreß am

bulgarischen Sonnenstrand wach. Ein weiterer großformatiger Tonfilm warb für Dänemark, wo 1985 der 37. IFEF-Kongreß stattfindet. Mit der Mahnung an die Teilnehmer, sich verstärkt für die Belange und Ziele der internationalen Sprache Esperanto einzusetzen, schloß GEFA-Präsident Gießner das Herbsttreffen und wünschte den Tagungsteilnehmern eine gute Heimreise.

Eine besondere Erwähnung verdient der umfangreiche Bücherstand des Esperanto-Zentrums Paderborn. Ein gutes Beispiel für die Zusammenarbeit mit anderen BSW-Freizeitgruppen boten die Ausstellung der Maler und die Aktivitäten der Eisenbahner-Funkamateure aus Köln, die mit ihren Geräten bei über zwei Dutzend in- und ausländischen Funkamateuren über die Veranstaltung berichteten. W.B.

Jarraporto pri la periodo de la 27a ĝis 28a jarkunveno (1983/84)

Enkonduko

La Germana Federacia Fervojo ĉie ajn propagandas la „Rozo-ruĝan Jaron“, por pliplenigi la trajnojn. Tutklare tio estas ekonomia afero. Por ni esperantistoj la nuntempo neniel estas roz-ruĝa male. De jaro al jaro ekzistas pli malmulte da fervojistoj, precipe junaj, paralele kun neintereso de ĝuste tiuj junaj homoj. Tio pli kaj pli malfaciligas la ekzistadon de societoj, kies bazo estas ne ekonomia, sed spirita. Sur tiu fono bonvolu analizi kaj tiri konkludojn el la sekva raporteto.

Ni perdis pro morto:

d-rino Luise Schramm (70)	3. 11. 83
Ernst Schilz	10. 12. 83
Hans Leng (68)	1. 1. 84
Dora Fehmel (83)	30. 4. 84
Adolf Westfehling (81)	10. 7. 84

Ni honoras la memoron je ili!

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

Kvankam la membronombro apenaŭ malkreskis, ĝi nekontentige evoluis de 477 al 473 individuaj membroj. Tio signifas, ke spite al la agnoskindaj klopodoj de

unuopuloj la novmembrigoj ne sufiĉis por kovri la perdon pro morto kaj ekziĝoj. En 1984 ni pagis al IFEF por 783 membroj, kion ebligas la korporativa membreco de la sindikatoj. Sekve ekde 1985 ni anoncos 4 komitatantojn al IFEF.

1.2 Kursoj

Estis anoncitaj 5 kursoj finiĝintaj en 1983 kun 23 partoprenantoj. Sekve devus esti pluso en la membroevoluo, se — ja se tiuj 23 personoj estus fariĝintaj membroj. Sed? ... Komenciĝis en 1983 ses kursoj, sed krome GEFA-membroj kunlaboris ankaŭ en 10 aliaj kursoj aranĝitaj de lokaj Esperanto-grupoj.

Kun ĝojo ni povas konstati, ke la longe planita kaj atendita telekurso (Fernlehrgang) de GEFA en somero 1984 povis esti lanĉita. Ĝi konsistas el lernolibro, sonkaseto kaj instruletoj kun taskoj, kiujn la kursanoj, ricevas korektitaj. La intereso por tiu kurso estas kontentige granda. Dum la unuaj monatoj la kursmaterialeto estas vendita pli ol 20foje. Tamen ankaŭ ĉi-rilate estas grava tasko de la kursgvidanto kaj de la distriktkomisiitoj, en kies distrikto la kursano loĝas, komune zorgi, ke li ne perdiĝos. Se la kunlaboro funkcias, la telekurso povos konsiderinde kontribui al stabiligo de nia membro-

nombro. Kompreneble ankaŭ la konataj du lernolibroj „Esperanto – eine lebendige Sprache“ kaj „Konversacia Kurso“ daŭre estas haveblaj.

1.3 Kunlaborantoj

La laborkonsilantaro (Arbeitsausschuß) Esperanto dufoje kunvenis kun la distriktaj kaj specialaj komisiitoj en Lüneburg (Oktoebro) kaj Würzburg (Marto). Ekde la unua de Januaro la longjara distrikt-komisiito J. Weidacher en München pro sia aĝo transdonis la oficon al pli juna kolego Adolf Hrazdil (Bf Augsburg Hbf). Kun efiko de la jarkunveno en Mönchengladbach grave ŝanĝiĝas la membroj de la laborkonsilantaro. Same pro sia aĝo la sekretario de GEFA, Joachim Schrapp, transdonas tiun oficon al la multe pli juna kolego Hans-Jürgen Riehn, Bm Mannheim.

2. Kunlaboro en IFEF

En la 36a IFEF-kongreso en Slančev Brjag (Suna Bordo) apud Burgas (Bulgario) partoprenis ĉirkaŭ 60 el niaj membroj. Kiel komitatanoj nin reprezentis W. Graß, E. Herlitze, W. Heimlich, G. Ritterspach kaj H. Schindler. Reelektitaj kiel prezidanto resp. sekretario de IFEF estis J. Giessner kaj O. Rösemann.

Ankaŭ en tiu kongreso la faka komponanto estis forte akcentita pere de „Aktualaĵoj“ el 11 landoj, i. a. ankaŭ pri DB, prezentitaj apud la fakprelego. Krome elstaris la abunda antaŭ- kaj dumkongresa informado eksteren kaj interne.

Por en la 37a kongreso en Vejle planita Literatura Konkurso kunlaboras kiel sekretario resp. juĝanto niaj membroj E. Kruse kaj W. Brandenburg.

Laŭ peto de la pola landa asocio la GEFA-prezidanto J. Giessner dufoje estis en Pollando, por konsili al la tiea estraro en la preparado de la 39a IFEF-kongreso. Krome li povis kiel gvidanto de la Historio-Komisiono post okjara laboro prezenti al la IFEF-membraro la rezulton de tiu laboro en formo de la konata Historio-broŝuro.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 27a jarkunveno okazis la 7an ĝis 9a de Oktobro 1983 en Lüneburg kun 125 partoprenantoj el 7 landoj. Detala

raporto en BULTENO 5'83. Multaj el niaj membroj partoprenis en jarkunveno de aliaj landoj kaj en la 25a Internacia Fervoja Esperanto-Skiseŝmajo (28. 1. – 4. 2. 84) en Maria Alm (Aŭstrio). Kelkaj eĉ kuraĝis entrepreni longanvoja al la UK Vancouver (Kanada) resp. partopreni en trisemajna rondvojaĝo en Ĉinio.

Preparlaboroj por la venontjara 70a UK Augsburg komenciĝis. GEFA-prezidanto J. Giessner estas membro de LKK precipe por certigi, ke la kongresanoj estos kontentige prizorgataj laŭ niaj fervojistaj vidpunktoj.

La kontaktoj al BSW kaj la sindikatoj estas daŭre bonaj.

4. Informado, varbado

4.1 Bulteno

Bulteno aperis kvinfoje (5/83 ĝis 4/84), la lasta kiel eldonaĵo de GEFA. Entute estis 38 paĝoj kun 15 fotoj. Sugestojn eldoni la Bultenon nur kvarfoje en la jaro, ni ne povis sekvi, ĉar jam kvin numeroj (antaŭ jaroj estis 6) ofte kaŭzas malfacilaĵojn pro la interplektado kun naciaj kaj internaciaj aranĝoj. Ni dankas ĉi-okaze al la ĉefestraro de BSW pro ĝia ĉiama grandanima subteno por la eldonado de la BULTENO.

4.2 Gazetaro

En oficialaj Bultenoj de DB (Amtsblätter) ni konstatis 7 (i. a. la kongresrezolucion), en tagaj gazetoj 61 publikigaĵojn pri nia agado. En la distriktaj BSW-komunikiloj plia deko de artikoloj aperis, bona okazo por la distriktkomisiitoj raporti pri sia laboro.

4.3 Varbado

Kiel kutime estis distribuitaj je diversaj okazoj ĉirkaŭ 2500 informiloj kaj kelkaj cent afiŝoj, kvankam la plej multaj el tiuj „semoj“ perdiĝas. Daŭre mankas respondeculo por varbado/informado, sen kiu tiu gravega parto de nia laboro ne povas funkcii. Kiam bonvolemlulo anoncos sin?

4.4 Prospekto

Estas eldonita en 1984 belaspekta ilustrita prospekto pri la Federacia Respubliko Germanio ankaŭ en Esperanto. Esence

kunlaboris en la tradukado nia membro G. Ritterspach.

4.5 Glumarko

„Helpe por la arbaro“ estas la celo de glumarko laŭ ideo de niaj membroj Joachim kaj Irene Giessner. Ĝi estis presita en la presejo Friedrichs (Herzberg) en lingvoj Esperanto kaj germana (vidu „Bultenon 1/84“).

5. Emerituloj

Fulda ĉi-jare estis la loko por emeritulrenkontiĝo. 35 personoj tie kunvenis la 1.9.1984 kaj pasigis gajajn horojn en

agrabla rondo (raporto en Bulteno 4/84).

Perspektivoj

Revenante al la „enkonduko“, ni ne bezonas meti la „kapon en sablon“. Male, ni uzu la kapojn por spite al ĉiuj malhelpaĵoj tiri nian ĉaron kun bona rezulto. Ni memoru, ke niaj germanaj kolegoj en la terura jaro 1923, kiam la marko malvalorigis de tago al tago (monata membrotokizo en Julio 300, en Septembro 75 000 markoj!), ke ili ĝuste en tiu jaro plialtigis sian membronombron de ĉirkaŭ 65 ĝis pli ol cent. En kia multe pli bona situacio estas **ni!**

kompilis Giessner

Matinea parolado de GEFA-prezidanto Giessner

En la tagordo de niaj jarkunvenoj ĉiujare troveblas „jarraporto“. Kaj kiel jam ĉiam en la lastaj jaroj mi ne intencas laŭtlegi ĝin. Vi trovos ĝin en tiu ĉi Bulteno. Mi nur ŝatas citi jenajn vortojn el la enkonduko de mia ĉi-jara jarraporto:

„La Germana Federacia Fervojo ĉie ajn propagandas la „Rozo-ruĝan Jaron“, por pliplenigi la trajnojn. Tutklare tio estas ekonomia afero. Por ni esperantistoj la nuntempo neniel estas roz-ruĝa, male. De jaro al jaro ekzistas pli malmulte da fervojistoj, precipe junaj, paralele kun neintereso de ĝuste tiuj junaj homoj. Tio pli kaj pli malfaciligas la ekzistado de societoj, kies bazo estas ne ekonomia, sed spirita, kiel la nia.“ (fino de la citaĵo).

La fama onidiro „Antaŭ la sukceson la dioj metis ŝvitadon“ ankaŭ por nia agado, pri la internacia lingvo Esperanto klare validas. Belega estas la rekompenco, kiun donas nia lingvo, post kiam oni estas dediĉinta al ĝi iom da penado por lerni ĝin. Ĉiam denove oni trovas homojn, kiuj timas la lernadon de Esperanto, ĉar ili ne konas la diferencon inter la tempa kaj spirita bezono necesaj por lerni ian ajn fremdan lingvon kaj la logikan Esperanton, la lingvon sen strangaj reguloj, sen neregulaĵoj, sen esceptoj. Estas tre grave, komprenigi tion al intereso, tamen ne fari la eraron kaj diri, ke lerni Esperanton estas afero senpena. Ĉiu, kiu jam gvidis kursojn, scias, ke por multaj homoj eĉ plej simplaj gramatikaj principoj povas esti problemoj.

Sekve ni saĝe agu, ne forĵetu nian „varon“, sed prudente „vendu“ ĝin. La postulitaj prezoj flanke de la lernantoj unuflanke estu mono – kio kostas nenion, tio valoras nenion – sed, pli grave, diligenteco kaj lerndisciplino. Tio validas por ĉiuspeca kurso, ĉu loke, ĉu tele. La plenumo de tiuj postuloj donas bonajn rezultojn, kio necesas por kontentigi la lernantojn, sed ankaŭ la kursgvidantojn, kiuj ŝatas vidi sukceson tutsame.

Kial mi ripetas tiujn sufiĉe konatajn maksimumojn? La respondo estas, ke bonrezultaj kursoj estas por ni decidaj pri morto aŭ vivo. Ni bezonegas ilin, kaj ne nur bonajn rezultojn, sed nepre kaj nepre necesas post la kursoj helpi al la kursanoj trovi la vojon al la Esperantoorganizo, do por fervojistoj prefere al GEFA. Sed krome ni ĉiam kaj ĉie fruktodone kunlaboru kun la grupoj de GEA.

Jen estas skizitaj kelkaj direktivoj por nia „ĉe-fronta“ agado. Eble mi forgesis diri, ke ni evitu altrudi nian lingvon al homoj, kiuj ne volas agnoski ĝin. Pli bone estas konvinkado. Kaj por povi konvinki necesas propraj scioj, propra konvinko, kaj ne laste iom da kuraĝo.

Ni esperantistoj apartenas al grupo de homoj, kiu ne povas apogi sin sur financaj mecenatoj, kiu ne disponas pri helpema forta interesularo. Sed ni apartenas al grupo, kiu ekkonis la multflankan valoron de la Internacia Lingvo kaj la neceson, enkonduki ĝin ĝenerale. Kaj tio starigas nin antaŭ la gigantan

taskon, zorgi por realigo de tiu ekkono. Tio postulas — mi ripetas — kuraĝon. Aparteni al kaj eĉ agadi por minoritato ĉiam postulas kuraĝon. Ni rigardu kiel honoron esti atakataj de arogantuloj, nenion-scioj, de homoj, kiuj kvalifikas sin mem per sia orgojla konduto. Sed ni helpu per ĉiuj rimedoj al homoj, kiuj montras pretecon kompreni la sencon de nia afero.

En la pasinta somero ni lanĉis la novan tele-kurson, bonege uzeblan por homoj,

GEFA-prezidanto Giessner parolis okaze de la ekziĝo de Joachim Schrapp el la ofico de la GEFA-sekretario en Mönchengladbach

Antaŭ 9 jaroj, en 1975, GEFA bezonis novan sekretarion. Tiam Joachim Schrapp tuj estis preta, transpreni tiun oficon. Tiu evento koincidis kun la likvido de la tiama direkcio Münster, kie li antaŭe estis distriktkomisiito. Ĉar antaŭ nelonge li atingis la aĝon de 70 jaroj, li esprimis la deziron retiriĝi post 15 jara agado por GEFA. Tio estas komprenebla deziro, kiun ni devis konsideri.

Joachim Schrapp jam antaŭ tiu oficiala laboro kiel funkciulo agadis en la loka grupo de Münster. Li esperantistiĝis en 1951 kaj bone utiligis la Internacian Lingvon tiel, kiel devas esti, nome por havi kontaktojn, amikojn ĉie ajn. Li regule vizitis la kongresojn de IFEF kaj la jarkunvenojn de GEFA kune kun sia vigla edzino Ursula, kiu ne nur toleris lian agadon, sed eĉ helpis lin. Ankaŭ en la internaciaj skisemajnoj ili estis aktivuloj.

Joachim Schrapp ne ŝatis agi en la hela lumo de publikeco. Li laboris modeste, senbrue kaj fideinde. Li apartenis al tiuj membroj, kiuj zorgis, ke la asocio povas vivi. Li frue ekkonis, ke Esperanto estas pli ol nura rimedo por komprenigi sin. Li ekkonis la esencon de tiu lingvo kaj tio kapabligis lin, trovi tempon kaj fortojn por nia granda, nobla afero.

Hodiaŭ estas nia vico, danki al vi, kara Jochen, pro ĉio, kion vi faris por ni, por GEFA, por IFEF, kie vi kunlaboris kiel komitatano, por la internacia lingvo Esperanto entute, kiu bezonas homojn kiel vi estas. Ni dankas vin kaj esperas,

kiuj aŭ ne havas okazon partopreni en loka kurso aŭ kiuj pro neregula laboro ne povas viziti tiajn kursojn. Ni senlace atentigu niajn kolegojn pri tiu unika ebleco lerni la lingvon kaj tiel aparteni al nia duobla familio esperantista-fervojiŝta. Tiamaniere **ĉiu** povas kontribui al la savo de nia asocio. Jam ĉiam en la historio de la homaro en horoj de danĝero la homoj estis pretaj, fari pli ol kutime por kontraŭbatali la danĝeron. Jen: nia asocio, nia GEFA estas en danĝero. Ni ekagu!

ke ankaŭ sen oficiala tasko ni ankoraŭ ofte povos vidi vin kun via edzino en niaj rondoĵoj naciaj kaj internaciaj.

Kiel eksteran signon de nia danko ni transdonas al vi ekzempleron de la noveldonita bildlibro pri la vivo de Zamenhof kaj — ĉar ni estas fervoĵistoj — diskon, sur kiu oni povas aŭskulti muzikaĵojn prezentitajn de fervoĵistoj.

Giessner

Neue Mitglieder

können wir herzlich begrüßen aus den Bezirken Essen und Hannover: Christel Spill, 4404 Telgte (Betr.St. Fka Münster/W) und Erich Buchholz, 3202 Bad Salzdettfurth. Wir gratulieren zu dem Entschluß unserer Vereinigung beizutreten.

Mitteilungen:

Die Anschrift unseres neuen Sekretärs H. J. Riehn, BHS, lautet: Bm 680 Mannheim, Basa 953/899/536 oder 1236.

Mit Bulteno 1/85 wird das neue Anschriftenverzeichnis veröffentlicht. Die Bezirks- und Sonderbeauftragten werden gebeten, bis 31. 12. 84 evtl. notwendige Änderungen der Redaktion mitzuteilen.

Das Frühjahrstreffen 1985 des Arbeitsausschusses mit den Beauftragten findet am 9. 3. 85 in Würzburg statt.


Das Seniorentreffen 1985 wird im Bezirk Frankfurt/Main stattfinden.

Die 29. GEFA-Jahresveranstaltung findet vom 4. — 6. 10. 85 in Lichtenfels statt. Mit Bulteno 2/85 werden Einzelheiten mitgeteilt und das vorläufige Programm mit Anmeldevordruck verteilt.

Verdienstkreuz am Bande

Am 8. Oktober 1984 wurden das Ordenszeichen und die Verleihungsurkunde im Sitzungssaal des Kreishauses in Osterode am Harz durch Oberkreisdirektor Böttcher im Beisein geladener Gäste verliehen.

Schüttenhelm (mit einer Gratulation in Esperanto) und Stadtdirektor Müller, für den BSW Bezirksvorstand Hannover Herr Reimann. Im Auftrage des Präsidenten der BD Hannover überreichte Herr Becker, GV Göttingen, ein persönliches Glückwunschsreiben.



**Martin Rother kiel reprezentanto de la BSW-ĉefestraro
gratulas al GEFA- kaj IFEF-prezidanto Joachim Giessner**

Der Oberkreisdirektor würdigte in seiner Ansprache die Verdienste des zu Ehrenden für Esperanto und damit die Bemühungen zur Verständigung mit den Angehörigen vieler Völker dieser Welt.

Es nahmen teil: Martin Rother (BSW-Hauptvorstand), für IFEF deren Sekretär Otto Rösemann, für GEFA deren Vizepräsident Wilhelm Graß und Elfriede Kruse, für die Stadt Herzberg Bürgermeister

Im Namen der Esperantogesellschaft Südharz gratulierte deren Vorsitzender Peter Zilvar mit einem Buchgeschenk. Wolfgang Zietz (Bulteno-Druckerei) beschloß den Reigen und übergab das Exemplar eines Kalenders für 1985.

Für die zahlreichen Glückwünsche und die vielen Blumengeschenke bedankte sich der Geehrte in einer Erwiderung, worin er besonders auf die Anerkennung hinwies,

die mit dieser Ordensverleihung für die internationale Sprache Esperanto und die durch sie ermöglichte, alle Landes- und Sprachgrenzen überschreitende kulturelle und völkerverbindende Tätigkeit zum Ausdruck gebracht werde.

Aus diesem Anlaß sei ein Rückblick auf die vielfältigen Tätigkeiten unseres verehrten 1. Vorsitzenden gestattet:

Joachim Gießner begann seine berufliche Laufbahn im Mai 1933 als Reichsbahninspektor-Anwärter im Bezirk Dresden, nach dreijähriger Ausbildung bei verschiedenen Dienststellen. Erste praktische Kenntnisse im Eisenbahndienst eignete er sich im Grenzübergangsbahnhof Franzensbad (Františkovy Lazne) (ČSR) von 1936 bis 1938 an. Seine pädagogischen Kenntnisse erwarb er anschließend als Betriebslehrer in Dresden und Umgebung. Während des 2. Weltkrieges leistete er Eisenbahnbetriebsdienst in Frankreich und Polen. Nach Kriegsende nahm er seinen Dienst bei der damaligen Oberbetriebsleitung West in Bielefeld auf. Ab 1954 wechselte er in das Fach des Dienststellenleiters mit den Beschäftigungsstellen Braunschweig, Elze und ab 1967 Herzberg/Harz, wo er mit seiner Gattin im eigenen Haus eine zweite Heimat gefunden hat. Als Vorsteher von Bahnhöfen mit wichtigen betrieblichen und verkehrlichen Aufgaben hat er sich großer Wertschätzung als Fachmann und Mensch erfreuen können. Mit Ablauf des 65. Lebensjahres durfte er in den wohlverdienten Ruhestand treten. Das Mehr an Zeit hat ihn zur Vervielfältigung seiner Tätigkeit für die Internationale Sprache verleitet, so daß wir von einem „Unruhestand“ sprechen können.

Im Mai 1973 feierte Joachim Gießner sein 40jähriges Dienstjubiläum und gleichzeitig eine 20jährige Tätigkeit für den BSW-Hauptvorstand als Beauftragter für Esperanto.

Esperantowerdegang:

Esperantist seit 1950. Gründer der Eisenbahner-Esperantogruppen in Bielefeld, Braunschweig, Elze und Herzberg. GEFA-Sekretär und Redakteur von 1953 bis 1956. GEFA-Präsident von 1956 bis 1968 und ab 1972. 1959 bis 1968 Leiter der IFEF-Kommission für Fachvorträge. 1952 Mitglied des Kongreßausschusses in Lindau.

Vorsitzender der Organisations-Ausschüsse für die IFEF-Kongresse 1967 in Fulda und 1981 in Regensburg. Seit 1968 IFEF-Präsident. Für seine Verdienste 1970 mit der Goldenen FISAIC-Medaille und 1981 mit dem Verdienstkreuz des Deutschen Esperanto-Bundes ausgezeichnet. Leiter vieler Sprachkurse. Verfasser zahlreicher Artikel und Übersetzer von Liedern und Gedichten.

Nur Esperantisten, die ein ähnliches Arbeitspensum bewältigen, können den ungeheueren Einsatz erlauben, den Joachim Gießner über viele Jahrzehnte für unsere Sache aufgebracht hat. Er verdient unseren uneingeschränkten Dank und unseren herzlichen Glückwunsch zu seiner Auszeichnung für diesen unermüdlchen Einsatz. Mögen ihm noch viele Jahre der Gesundheit und des Erfolges beschieden sein.

Graß

Aus den Gruppen

Bremen: La Zamenhoffesto okazos la 12an de Decembro.

Dortmund: Der Esperanto-Kreis in der rheinisch-westfälischen Auslandsgesellschaft veranstaltete im Oktober einen Diskussionsabend „100 Jahre Esperanto – Planungen für das Jubiläumsjahr 1987“ und einen Diavortrag „Mit Esperanto kreuz und quer durch Spanien“. Am 26. 11. führte Heinz Schindler seiner Diaserie „Als Esperantist in China“ vor. Am 8. 12. wird zum traditionellen Jahresausklang das Zamenhof-Fest gefeiert. Außerdem wird das französische Esperanto-Kulturhaus „Grésillon“ vorgestellt.

Frankfurt/Main:

Laŭlonge la paŝojn de Zamenhof

Laŭ invito de la BSW-Esperanto-grupo Frankfurt dimanĉon, la 9an de Septembro kunvenis esperantistoj el la regiono Frankfurt en Bad Nauheim por fari migradon. Kompreneble la unua celo en Bad Nauheim estis la domo, en kiu Zamenhof iam loĝis kiel kuracgasto. S-ro Ritterspach estis sciiginta, ke Zamenhof tiam estis migrinta al la monto Johannisberg proksime de la urbo. Nun ni estis sur la sama vojo kiel Zamenhof.

Kvankam pluvis la grupo restis gaja, ĉar ĉiuj estis ĝuste vestitaj, kaj pro tio la vetero ne ĝenis nin. En agrabla restoracio ni ĝuis la tagmanĝon.

Nun ni marŝis ankoraŭ kvar kilometrojn ĝis la fincelo, la loĝejo de gesinjoroj Ullmann en Friedberg. Tie atendis nin varma kafo kun kukoj.

Al gesinjoroj Ullmann kaj gesinjoroj Kiefer, kiuj organizis tiun tagon, tre koran dankon.
Rabenstein

Garmisch-Partenkirchen:

Denove mi invitis la GEFA-membrojn kune kun la Esperanto-klubo München por migri kaj ĝoji; la 27. 10. 84 jam matene mi povis saluti 15 ges-anojn en la stacidomo Garmisch-Partenkirchen. Ni veturis ĝis la plej altsituanta Intercity-stacio de Germanio, Klais. Tie ni ekmarŝis, baldaŭ ni preterpasis la du lagojn, Grubsee kaj Barmsee, kiuj situas solece en montarbaro. Super la Finzbachklamm sur altaj rokoj kun rigardo profunde malsupren al la muĝanta rivereto ni faris manĝpaŭson. Poste ni migris dum kelkaj horoj tra la romantika, ankoraŭ netuŝita Finzbach-valo. En la Esterberg-Alm ni sidis kune kun biero en gaja rondo. Kunmarŝis ankaŭ la trezoristo de la GEA, Fritz Hilpert kun sia edzino el Brazilio, ili antaŭe geedziĝis. Hispanino, Polino kaj Anglo estis inter ni. Ĉefe junaj migrantoj kun granda intereso observis nian internacian rondon. Jam noktigiis, kiam ni marŝis malsupren al Partenkirchen. Post vespermanĝo en la stacidom-restoracio sufiĉe lacaj sed tre kontentaj la ges-anoj reveturis al München. Ni mirigris preskaŭ 30 kilometrojn, do, inter niaj Esperantistoj troviĝis sufiĉe multaj sportemaj montar-migrantoj!

La Zamenhoffesto okazis jam la 24an de Novembro.

Fred Gissibl

München:

Unter dem Titel „Sprachbarrieren, ein Kernproblem auf dem Weg nach Europa“ wurde vom 17. – 28. 9. in einer Ausstellung die Geschichte der Arbeiteresperanto-Bewegung von 1903 bis 1933 gezeigt. Josef Weidacher arrangierte die erfolgreiche Ausstellung.

Nekrologoj

La fidela membro de la Esperanto-Grupo Bremen

Heinrich Meiners (71)

forlasis nin la 6an de Oktobro 1984 por ĉiam.

Dum sia aktiva partopreno li estis tre ŝatata en niaj grupkunvenoj kaj kontribuis rimarkinde en la studrondoj. Nur lia longa, sufera malsano malhelpis lin kunagi.

Li restas en nia memoro!

Ni kondolencas al liaj edzino kaj parencoj.

— † —

Unu post la alia formortas la esperantistaj veteranoj en Sarlando, inter ili ankaŭ fervojistaj: post O. H. Winkelhaus kaj E. Schilz. En Julio 1984 sekvis

Oskar Höh, Homburg.

Lia nomo ligiĝas al la rekonstrua fazo postmilita. En la verko „Esperanto en Sarlando“ de J. Schenkel ni legas:

„En Marto 1955 fondiĝis en la kadro de Sarlanda Esperanto-Asocio faka grupo de fervojistoj. Gvidanto estis Oskar Höh el Homburg. Laŭ iniciato de tiu grupo sub gvidado de Oskar Höh de la 14a ĝis 16a de Majo 1955 en Homburg okazis postkongreso de IFEF. Tiu aranĝo ĝuis multflankan oficialan subtenon.“ (Kp. ankaŭ „Bulteno“ 3/1955, p. 3)

Malsana kaj maljuna, Oskar Höh dum la lastaj jaroj ne povis plu aktivi en la movado. GEFA kaj aparte la sekcio Saarbrücken funebras pro la perdo de volora kaj fidela membro.

Ni kondolencas la geparencoj.

GEFA

Diskriminierung?

Im Amtsblatt der Deutschen Bundesbahn Nr. 33 v. 8.8.1984 erschien die Resolution, die der 36. Internationale Kongreß der Eisenbahner-Esperantisten im Mai einstimmig verabschiedet hatte. Wir haben sie im „BULTENO“ Nr. 3 in deutscher Übersetzung veröffentlicht. Diese Eisenbahner aus ganz Europa betonen im 1. Absatz der Resolution, daß sie mit Hilfe der internationalen Sprache Esperanto „Über alle Staatsgrenzen und Unterschiede der Weltanschauungen hinweg . . . ohne Sprachdiskriminierung . . . dem Weltfrieden dienen wollen“.

Im 2. Absatz stellen sie fest, daß „internationale Vereinigungen, Eisenbahnen, Eisenbahner-Gewerkschaften und andere Eisenbahner-Vereinigungen die anzuwendende Sprache egoistisch und diskriminierend festsetzen und dadurch eine bestimmte Gruppe von Menschen . . . begünstigen und alle anderen zwingen, sich in einer fremden Sprache auszu-drücken oder ganz darauf zu verzichten, sich zu Wort zu melden“.

Im dritten Absatz empfehlen sie, sich der internationalen Sprache Esperanto zu bedienen und somit **sprachliche Gleichberechtigung zu garantieren**.

Im Amtsblatt der DB Nr. 35 erschien unter der Überschrift „36. Kongreß der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF)“ folgender Text: „Die im ABI/DB Nr. 33/84 **nachrichtlich** abgedruckte „Resolution“ wurde uns von der Vereinigung deutscher Eisenbahner-

Esperantisten im BSW-Bezirk Frankfurt (M) mit der Bitte um Bekanntgabe übersandt. Es handelt sich hierbei **nicht** um eine amtliche Veröffentlichung im Sinne der ABI/DB-Verfügungen.“

Nun, jedermann weiß, daß eine solche Resolution keine „amtliche“ Veröffentlichung ist. Warum also mußte das in einer zusätzlichen Notiz so geflissentlich betont werden? Man sollte es nicht glauben, aber bei der DB gibt es Kollegen, die in solch einer Resolution eine Diskriminierung der deutschen Sprache sehen und deshalb die Veröffentlichung im Amtsblatt beanstandet haben.

Jede Stellungnahme hierzu erübrigt sich. Wer Augen hat zu lesen, der lese. Und dann müßten ihm eigentlich die Augen darüber aufgehen, wo die Diskriminierung liegt.

Gießner

Vom Himmel hoch — El alta ĉielo

Vortoj de Martin Luther

traduko: Joachim Giessner

- | | |
|--|--|
| <p>1. Vom Himmel hoch da komm ich her,
ich bring euch gute, neue Mär.
Der guten Mär bring ich so viel,
davon ich singen und sagen will.</p> <p>2. Euch ist ein Kindlein heut geborn,
von einer Jungfrau auserkorn,
ein Kindelein so zart und fein,
das soll euer Freud und Wonne sein.</p> <p>3. Es ist der Herr Christ, unser Gott,
der will euch führn aus aller Not.
Er will eur Heiland selber sein,
von allen Sünden machen rein.</p> <p>4. Des laßt uns alle fröhlich sein
und mit den Hirten gehn hinein,
zu sehn, was Gott uns hat beschert,
mit seinem lieben Sohn verehrt.</p> <p>5. Lob, Ehr sei Gott im höchsten Thron,
der uns schenkt seinen eignen Sohn.
Des freuet sich der Engel Schar
und singet uns solch neues Jahr.</p> | <p>1. El alta ĉielo portas mi
novaĵon bonan jen al vi.
Pri dibonec' kaj difavor'
kantadas nun l' anĝela ĥor'.</p> <p>2. Infan' naskita ja por vi
de virgulin' pro grac' de Di'.
Kaj delikate ĝi sen fin'
ĝojigu amoplene vin.</p> <p>3. Li estas Kristo, la Sinjor',
kondukos mondon el dolor'.
Savanto estos li por vi,
purigos vin de l' pekoj li.</p> <p>4. Ni laŭdu lin per ĝoja son'
kaj iru al la dia don'.
Kun la paŝtistoj vidu ni
la filon, kiun sendis Di'.</p> <p>5. Al Dio glor', honor' kaj grac'
pro lia fil', ĉieldonac'.
L' anĝeloj ĝoje kantas nun
pri estonteco kaj fortun'.</p> |
|--|--|

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Redaktfino por n-ro 1/85 estas la 15.1.85.